
Perkomputora Termino-Kolekto (Terminoteko)

Bernhard Pabst
D-53773 Hennef

Südweg 42
Germanujo

Cirkulero n-ro 1, stato «93-08-02»

Al kontribuintoj kaj interesitoj de la kampanjo „Fariĝu lingvo-observanto“

Estimata sinjorino,
estimata sinjoro

Per tiu cirkulero mi volas informi vin pri la kialoj kaj kieloj de nia kampanjo "Fariĝu lingvo-observanto".

Celo de nia kampanjo

Ni celas registri en elektronika vortaro laŭeble multajn aktualajn vortojn de la nuntempo, kiuj ja estas uzata en vivanta Esperanto, ekz-e en libroj aŭ revuoj, sed kiuj tamen ne ankoraŭ estas registritaj en Plena Ilustrita Vortaro (PIV) el la jaro 1970, aŭ ĉar ili estas tro fakaj, aŭ ĉar ili estas terminoj por objektoj, kiujn oni ankoraŭ ne (vaste) konis en 1970, ekz-e terminoj pri komputiko.

Kerno de la vortaro estas Esperantaj difinoj kaj tradukoj al laŭeble multaj etnaj lingvoj. Krome registriĝos fontoj kaj rimarkoj pri uzataj aŭ proponitaj terminoj. Fine la verko enhavas diversajn indeksojn. Detalojn vi vidos en la subaj ekzemploj.

La registrado okazas laŭ la sistemo „Perkomputora Termino-Kolekto (Terminoteko)“ iniciita de Akademiano *Eichholz* 1985. Intertempe ĝi fariĝis la plej uzata elektronika vortaro, en kiu jam kolektiĝis pli ol dekmil terminoj el multaj diversaj fakoj. De tempo al tempo aperos printitaj versioj de la vortaro, tiel ke ĉiuj interesatoj povas facile konsulti ĝin. Terminoteko uzas IBM-kompatiblajn komputorojn kaj la tekstprogramon *Word Perfect* 4.2. Tamen jam delonge ekzistas rutinoj kaj normoj por ebligi la kunlaboron de komputorantoj zuantaj aliajn sistemojn aŭ programojn, ekz-e *Atari* aŭ *Word*. Interesatoj skribu al la supra

adreso menciante, kiun komputoron kaj programon ili povas uzi.

Grave estas, ke pro la printitaj versioj ankaŭ nekomputorantoj povas fariĝi „lingvo-observanto“ kaj sukcese kunlabori.

Kion vi faru estante "lingvo-observanto"?

Nu, simple jenon: Ĉiam, kiam vi legas Esperanto-vorton, -terminon aŭ -nomon en iu revuo aŭ libro, vorton, kiun vi ne konas, vi kontrolas en PIV kaj ties suplemento (PIVS), ĉu la termino jam ekzistas tie. Se jes - kaj vi estos surprizita kiom da leksoj PIV jam entenas - vi lernis novan vorton, kaj fino. Se ne, vi notu ĝin, kune kun la frazo, en kiu ĝi estas uzata, kaj la difino, se ĝi estas donita. Se vi opinias, ke vi laŭ la difino aŭ la kunteksto konas la tradukon de la nova vorto en via gepatra aŭ en iu alia lingvo, kiun vi regas, vi aldonu la naci-lingva(j)n ekvivalento(j)n. Se vi deziras, vi kompreneble povas komentarii aŭ kritiki la novan vorton, difinon ktp. Vidu pri tio la subajn ekzemplojn.

Se vi disponas pri komputoro vi tuj klavas la trovitajn terminojn laŭ la reguloj de Ter-

minoteko (petu regularon). Se vi estas nekomputoranto vi okaze, eble unu- aŭ dufoje jare sendas legeblajn foliojn kun la de vi kolek-t-itaj terminoj al la supra adreso.

Kion ni ĝis nun faris

En 1991 kolektiĝis ĉ. 375 nocio-kompleksoj en la kadro de „lingvo-observanto“, do pli ol unu ĉiun tagon. Eĉ dense printitaj kiel tiu ĉi cirkulero, ili sole kovras 41 paĝojn. Nur malmultajn mi pro tio povas aldoni. Same kiel ĉiuj aliaj partoj de Terminoteko, la kompleta kolekto tamen estas havebla sur diske, legebla per IBM-kongrua komputoro. Kelkaj terminoj estas tiel modernaj, ke eĉ en etno-lingvaj enciklopedioj oni ne ankoraŭ trovas informojn pri ili, ekz-e pri „karaoko“, kvankam preskaŭ ĉiu junulo en okcidenta lando scias, pri kiu temas. Kiel ĉiam en la kadro de "lingvo-observanto" viaj traduk-proponoj, kritikoj kaj aldonoj estas bonvenaj.

La estonteco

Ankaŭ en 1992 ni daŭrigas nian kolekton de aktualaj vortoj laŭ la nun jam bone establita metodo. Ĉiuj interesatoj estas invitataj kunhelpi pri la kom-

pletigo de aktuala internacia vortaro de Esperanto. Ĉar la plimulto de la ĝisnunaj kontribuantoj denaske parolas la la Germanan aŭ Anglan, ni precipe ĝojus pri kapablaj kunlaborantoj kun aliaj gepatraj lingvoj.

PABST, Bernhard (pb)

Klarigo de kelkaj mallongigoj:

{Eo1} **unua Esperanta termino** *a ← referencas al la fonto-kampo (Fon:)

{Eo2} **dua Esperanta termino** *a

{De1} unua Germana termino kun gramatika genro *c

{En1} unua Angla termino *b

{En2} dua Angla termino *ĉ Esperanta difino.

Fon: *a MON(ato, jaro, kajero, paĝo); *b KR(ause, Vortaro Germana-Esperanto); *c BU(utler Eo-En); *ĉ ktp.

9 1 / p b – 1 2 3 ←

Terminoteko-numero

Rim: «92-04-29» ← Rimarko kaj dato

Kelkaj novaj Terminoteko-kompleksoj el 1991:

{Eo1} **Jun/aj Turk/oj** *a

{De1} Jungtürken *m, pl* *b

{Fr1} jeunes-turcs *m, pl* *b

Turka partio organizita por efektiviĝi radikale politikajn k sociajn reformojn. La revolucio de la ~oj en 1908 devigis la sultanon proklami konstitucion k liberigi, inter aliajn, ĉiujn religiajn malliberulojn. *b laŭ *a

Fon: *a Essle,p303; *b pb.

9 1 / p b – 0 0 3

Rim: «91-04-19»

{Eo1} **blu_kask/ul/oj** *a

{De1} Blauhelme *m, pl* *b

Fam. por UN-soldatoj pro ties bluj kaskoj. *b

Fon: *a MON 91/4,p7; *b pb.

9 1 / p b – 0 2 6

Rim: «91-04-19»

{Eo1} **varm_dom-efik/o** *a

{Eo2} **forc/ej-efik/o** *c

{Eo3} **vitro-dom/a efik/o** *ĉ

{Eo4} **oranĝeri/a efik/o** *d

{De1} Treibhauseffekt *m* *b

{En1} greenhouse effect *ĉ

Aŭtoj kulpas pri la duono de la ~o. *a

Fon: *a MON 91/4,p15; *b pb; *c MON91/7,p18; *ĉ por en ELNA 91/1, p7; *d redaktisto en ELNA 91/1,p7.

9 1 / p b – 0 2 8

Rim: pb: Mi preferas la pli ekzaktan {Eo2}. "Varmdomo" ne tiom rekte klarigas, pri kiu temas k ankaŭ "vitrodomo" estas pli ĝenerala. «91-09-19»

{Eo1} **Fanakal**/o** *a
Piĝino, uzata precipe de
minejaj laboristoj en Sudafriko.
*a

Fon: *a go en MON 91/4,p24.

9 1 / p b – 0 3 2

Rim: <91-04-19>

{Eo1} **tangram**/o** *a

{De1} Tangram

Ludo, eldonitaj fine de
la 19-a aŭ komence de la 20-a
j.c. k konsistanta el 7, 8 aŭ pli da
kaheletoj en formoj de divers-
grandaj kvadratoj, trianguloj,
paralelogramoj k.a. geometriaj
figuroj, kiujn kunmetante la
ludanto kreas vastan gamon da
diversaj mozaikaj bildoj, ekz-
de domo, koko ktp. *b laŭ *a

Fon: *a MON 89/10, 91/4-27;
*b pb.

9 1 / p b – 0 3 4

Rim: <91-04-19>

{Eo1} **sūahil**/a** *a *g

{Eo2} **svahil*/a** *a *ĉ *e *f

{Eo3} **svahil/o** *c *ĝ EVIT *a
*b

{De1} Suaheli *n (Sprache)* *d
*f

{De2} Swahili *n (Sprache)* *f

{En1} Swahili (*language*) *e

1. Rilate al la ~oj
(91/pb-???) k la teritorio loĝata
de ili. *b laŭ *a

2. Orient-Afrika regiona inter-
lingvo, geneze apartenanta al la
Bantua lingvo-familio, forte
influita de la Araba k havanta
leksikajn elementojn venantajn
ankaŭ de kelkaj Aziaj k Eŭropaj
lingvoj. La ~a estas nacia lingvo
de Tanzanio k Kenjo k la ofi-
ciala lingvo de Tanzanio. *b laŭ
*a → ~o (91/pb-???)

Fon: *a go en MON 91/4-23; *b
pb; *c PIV; *ĉ Jan Knappert,
Vortaro de Eo k Svahila; *d
Wah; *e WE; *f KR; *g S. Cul-
bert en MON 91/4-20; *ĝ OK-
ED.

9 1 / p b – 0 3 5

Rim: go en MON 91/4-23; **1.**
Mi opinias, ke estas pli ĝuste
nomi la homon sūahilo/svahilo k
la lingvon ~a. La PIV-a uzo de
~o por la lingvo estas EVIT.

2. Inter sūahilo k svahilo mi
preferas la formon kun ŭ, do
{Eo1} kontraŭ la uzo ĉe
Knappert {Eo2}.

pb: **1.** Mi konsentas kun go pri
la unua punkto. Same faras WE,
KR, Knappert, Culbert, nur OK-
ED sekvas PIV-on. Kp. simile
la EVIT PIV-an "afrikanso" por
Af anstataŭ "la Afrikansa". La
analogio al multaj aliaj lingvoj
finiĝantaj je -a tro forte efikas.

2. Pri la dua punkto, nome la
problemo de antaŭvokala "ŭ",
mi dubas. Bedaŭrinde go ne
donas argumentojn. al nuntempe
rigore rifuzas ĝian uzon, kp. la

diskuton ĉe inkvesto/inkŭesto (89/pb-0500).

3. Same kiel LK mi preferas la formon kun majusklo (Svahila), vd. la diskuton en EB p. 4. «91-04-19»

{Eo1} **desperad**/o** *a
{De1} Desperado *m* *b
{En1} desperado *a
Viro, ne hezitanta fari
ian ajn perfortan krimon;
ribelanto kontraŭ leĝoj k
ordonoj: *La rajdpolicanoj
batalis kontraŭ bando de ~oj.* *a
Fon: *a FL;

9 1 / p b - 0 4 9

Rim: «91-04-20»

{Eo1} **halm**/o** *a
{De1} Halma *n* *b
{En1} halma *a
Tabla ludo por du per-
sonoj, ludata per aro da mal-
grandaj pecoj sur tabulo kun 256
kvadratoj. *a
Fon: *a FL; *b pb.

9 1 / p b - 0 5 3

Rim: FL: ETIM el Helena radi-
ko. «91-04-20»

{Eo1} **kartun**/o** *a
{De1} Cartoon *m* *b
{En1} cartoon *a
Historieto en unu aŭ
pluraj desegnitaj aŭ pentritaj
bild(et)oj, kiu metafore, ofte
satire prezentantas kritikon aŭ

opinion, ofte politikan. *c laŭ *b
~isto (91/pb-055); → kari-
katuro, satira desegnaĵo

Fon: *a FL; *b Wah; *c pb.

9 1 / p b - 0 5 4

Rim: «91-04-20»

{Eo1} **kindergarten**/o** *a
*h *h̄ *i *j *ĵ
{Eo2} **infan-vart/ej/o** *b *k
{Eo3} **infan-ĝarden/o** *c *ĉ
*d *k *l
{Eo4} **lern-lud/ej/o** *c *h *j
*k
{Eo5} **antaŭ'lern/ej/o** *e
{Eo6} **vart/ej/o** *f
{Eo7} **et/ul-lern/ej/o** *ĝ
{Eo8} **infan-gard/ej/o** *j *ĵ
*k

{De1} Kindergarten *m* *c *h
{En1} kindergarten *a *e
{Es1} parvulario *m* *g
{Es2} escuela *f* de párvulos *ĝ
{Fr1} jardin *m* d'enfants *ĉ *f
Lernejo, kie oni in-
struas la junajn infanojn per
edukaj ludoj: *ĉ *Tiuj infanoj nun
vizitas la ~on, sed estonte ses-
aŭ sep-jaraj, ili iros al baza
lernejo.* *b

Fon: *a FL; *b pb; *c KR; *ĉ
GD; *d PIV 364; *e WE; *f LA;
*g LangT-De-Es; *ĝ TF-Es-
Eo; *h EV; *h̄ HL; *i OJ; *j WI;
*ĵ Chris; *k OK-DE; *l BO.

9 1 / p b - 0 5 9

Rim: pb: Preciza termino ne
estas tiel facile trovebla, kiel

spontanee ŝajnas, kion montras la multeco de la tradukproponoj. Ankaŭ la PIV-a "infanĝardeno" nur estas komprenebla, se oni konas la Eŭropajn kalkkeojn. Per si mem {Eo3} estas misgvida, ĉar kutime tute ne temas pri ĝardeno, sed oni celas domon, similan al lernejo aŭ eĉ la institucion kiel tian. Aliflanke ŝokas la "Germaneco / Angleco" de {Eo1} legante la vorton unuan fojon. Tial mi spontanee metis EVIT post ĝi, tamen poste forprenis la indikon denove. Almenaŭ ĝi estas malnova neologismo, estanta jam en FL de 1921 k pro tio en Chris de 1923 (kun referenco al FL), kiel ankaŭ en la samepoka EV de 1923 k pro tio kiel kutime nun denove en la modernaj Aziaj vortaroj OJ (1963) k HL (1983); krome – verŝajne ankaŭ pro EV – en la postmilita WI de 1954. Laŭ mia nuna opinio {Eo1} estas almenaŭ same bona aŭ malbona kiel "infanĝardeno". Sed ŝajne sufiĉas "infangardejo" aŭ "lernludejo". «91–04–20»

{Eo1} **nektaren**/o** *a
 {Eo2} **nektarin/o** *b*c
 {De1} Nektarine *f**c
 {En1} nectarine *a
 {Fr1} brugnon *a
 Glathaŭto persiko
 (frukto de *Prunus persica*
nectarina)

*b

Fon: *a FL; *b PIV; *c OK–ED.

91 / p b – 073

Rim: pb: Mi preferas la "pli E-an" formon je "-en", kiu evitas la "falsan parencon" "-in", kp. la "-et/-ed"-vortojn k miajn argumentojn en AkSt 88–90, 428. «91–04–20»

{Eo1} staŭt**/o *a
 {De1} Stout *m* *b
 {En1} stout *a

Speco de malpala biero, simile al portero, sed pli forta, ofte rekomendata por mal-sanuloj. *a

Fon: *a FL; *b DUD–Fr.

91 / p b – 089

Rim: «91–04–20»

{Eo1} **ĉikan**/o** *a
 {En1} chicano *a
 {Es1} chicano *m* *a

Ido de Hispan-lingvaj, precipe Meksikaj, enmigrintoj al Usono, kiu, apartenante al la "dua generacio" de enmigrintoj naskiĝis en Usono k estis edukita en Usonaj Anglalingvaj lernejoj. Ĉ-oj kutime vivas dumtage en la Anglalingva kulturo de lernejo aŭ laborejo, vespere en la Hispan-lingva kulturo de gepatra hejmo k loĝkvartalo: *Ofte majstrante nek la Anglan, nek la Hispanan, k vivante inter du kulturoj, ~oj*

sentas sin multfoje fremduloj.
→ **~a literaturo, ~a arto** *b laŭ
*a

Fon: *a ArizSun91/1,p2; *b pb.

9 1 / p b - 0 9 9

Rim: <91-04-20>

{Eo1} **ter-sen'mov/a orbit/o**
*a

{Eo2} **ter-sinkron/a orbit/o**
*b

{De1} geostationäre
Umlaufbahn f *b

{En1} geostationary orbit
<*c>

*Satelito sur ~o super la
ekvatoro havas plej grandan
efikon.* *b laŭ *a → **polusa
orbito** (91/pb-179)

Fon: *a TScT90/3-4,p19; *b pb;
*c Webs.

9 1 / p b - 1 0 7

Rim: <92-02-14>

{Eo1} **ozon/a tavolo** *a

{De1} Ozonschicht f *b

{En1} ozone layer *c

{En2} ozonosphere *c

Tavolo en alto de 20-
25 km en la stratosfero. La ~o
ne lasas pasi al la tero la
kosmajn, precipe ultraviolajn
radiojn, kiuj estas danĝeraj por
ĉiuj vivoformoj. Atmosfera
poluo dum la lastaj jaroj
maldikigis la vivprotektan
ŝirmon de la ~o. *b laŭ *a
→ **ozona truo** (91/pb-178)

Fon: *a MON91/7,p18; *b pb;
*c Webs.

9 1 / p b - 1 1 2

Rim: <91-12-29>

{Eo1} **klor/o-fluor-
karbon/at/o** *a

{Eo2} **KFK** *a

{De1} Fluorchlor-
Kohlenwasserstoff *m*
*b

{De2} FCKW *b

{Es1} CFC *b

Kemiaĵo, konsistanta el
kloro, fluoro k karbono k uzata
precipe kiel malvarmigaj
fluidaĵo, kiu grave kontribuas al
la maldikiĝo de la ŝozona tavolo
(91/pb-112). *b laŭ *a

Fon: *a MON91/7,p18; *b pb.

9 1 / p b - 1 1 3

Rim: <91-08-29>

{Eo1} **merŝaŭm**/o** *a

{Eo2} **mar-ŝaŭm/o** *b*

{De1} Meerschaum *m* *b

{En1} meerschaum *a

Mineralo, konsistanta el
hidrata magnezia silikato, uzata
por fari pipojn. *a

Fon: *a DNp8; *b WI; *c PIV.

9 1 / p b - 1 1 8

Rim: <91-08-29>

{Eo1} **spion/a satelit/o** *a

{De1} Spionagesatellit *m* *b

{En1} spy satellite *a

Fon: *a por en ELNA91/1,p7;
*b pb.

9 1 / p b – 1 2 5

Rim: <91–08–30>

{Eo1} **teori/o de la grand/a
krak/o** *a

{Eo2} **univers–eksplod/a
teori/o** *c

{De1} Urknalltheorie *f* *b

{En1} big–bang theory *a

Fon: *a por en ELNA91/1,p7;
*b pb; *c redaktisto en ELNA
91/1,p7.

9 1 / p b – 1 2 6

Rim: <91–08–30>

{Eo1} **front–rad/a
transmisi/o** *a

{De1} Vorderradantrieb *m* *b

{En1} front wheel drive *a

Fon: *a por en ELNA91/1,p7;
*b pb.

9 1 / p b – 1 3 0

Rim: <91–08–30>

{Eo1} **mikro'ond/a forn/o**
*a*c

{De1} Mikrowellenherd *m* *b

{De2} Mikrowelle *f* (*umg*) *b

{En1} microwave oven *a

{N11} microgolfoven *c

Fon: *a por en ELNA91/1,p7;
*b pb; *c Middel,p268.

9 1 / p b – 1 3 5

Rim: <91–08–30>

{Eo1} **mar/a bor–platform/o**
*a

{De1} Bohrsinsel *f* *b

{En1} offshore drilling
platform *a

Fon: *a por en ELNA91/1,p7;
*b pb.

9 1 / p b – 1 3 6

Rim: <91–08–30>

{Eo1} frost/o–sek/ig/ad/o *a

{De1} Gefriertrocknen *n* *b

{En1} freeze drying *a

Fon: *a redaktisto en ELNA
91/1,p7; *b pb.

9 1 / p b – 1 4 5

Rim: <91–08–30>

{Eo1} **kontinent/a driv*/o** *a

{De1} Kontinentaldrift *f* *b

{En1} continental drift *c

Teorio, laŭ kiu konti-
nentoj malrapide ŝanĝas siajn
poziciojn pro kurentoj en la
fanditaj rokoj de la ter–mantelo
(91/pb–157). *b laŭ *c

Fon: *a ArizSun91/2,p5; *b pb;
*c Webs

9 1 / p b – 1 5 6

Rim: <91–09–08>

{Eo1} **Laŭrazi**/o** *a

{En1} Laurasia *a*b

Hipoteza iama pra-
kontinento, konsistinta de la
hodiaŭaj Nordameriko k Eŭrazio
k laŭhipoteze disiĝita k

formovita de Pangeo (91/pb-159) ĉ. la fino de la Paleozoiko.
→**Gondvano** (91/pb-159) *c
laŭ *b

Fon: *a ArizSun91/2,p5; *b
Webs; *c **pb**.

9 1 / p b – 1 6 1

Rim: <91-09-08>

{Eo1} **pinjat**/o** *a

{En1} piñata *b

{Es1} piñata *b

Paper-maĉaĵa pupego,
enhavanta dolĉaĵojn k ludilojn,
kiun oni en Meksiko okaze de
iuj festotagoj pendigas al la
plafono, por ke la infanoj kun
kovritaj okuloj lude disrompu
ĝin svingante bastonon. *a laŭ
*b

Fon: *a **pb**; *b Webs.

9 1 / p b – 1 6 2

Rim: <91-09-08>

{Eo1} **ĉaled**/o**
*a*ĉ*d*e*f*g

{Eo2} **ĉalet/o** *b*c

{De1} Chalet *n* *c

{De2} Berghütte *f* *c

{De3} Sennhütte *f* *c

{En1} chalet *ĉ

{Fr1} chalet *m* *d

{Nl1} chalet *a

Montara domo, farita el
arbotrunkoj aŭ tabuloj, kun
malalta tegmento kovrita per
ŝindoj. *b

Fon: *a Middel; *b PIV; *c
OK-ED; *ĉ WE; *d LA; *e Bg;
*f EKor; *g NEoJap.

9 1 / p b – 1 7 7

Rim: **pb:** Pri -ed aŭ -et vd. **pb**
en AkSt88-90,p428ss. Pro la tie
donitaj kialoj mi preferas la for-
mon je -ed. <91-09-16>

{Eo1} **desodorant**/o** *a

{Eo2} **sen'odor/ig/il/o** *b

{De1} Deodorant *n* *c

Fon: *a Kiŝono, Elektitaj Sati-
roj, trad. Ziglero, 1981, p. 39; *b
ergo; *c **pb**.

9 1 / p b – 2 1 8

Rim: <91-10-27>

{Eo1} **klup**/o**
*a*b*c*ĉ*d*e*f*g*ĝ

{Eo2} **helic-tranĉ/il/o** *a

{De1} Kluppe *f* *a*c

{De2} Schneidkluppe *f*
*c*d*ĝ

{De3} Gewindeschneider *m*
*a*ĝ

{Nl1} draadsnij-ijzer *g

Ilo servanta por en-
tranĉi helicon en bolton. *a

Fon: *a TW; *b BT; *c EV; *ĉ
NEoJap; *d STT; *e PIV-
manuskripto; *f CH; *g Middel;
*ĝ KR

9 1 / p b – 2 2 5

Rim: **pb:** "klupo" de post <EV>
estas en multaj gravaj vortaroj;
laŭ <TW> ĝi ankaŭ troviĝis en
la manuskripto de PIV. Ne estas

klare, kial ĝi mankas en la fina versio. <91-10-27>

{Eo1} **remi**/a** <*a>*c
{Eo2} **remis**/a** *c
{Eo3} **ne'decid/it/a** *b
{De1} remis (*Schach*) *b*c
{De2} unentschieden *c
Fon: *a ergo; *b WI; *c BT;

9 1 / p b - 2 3 2

Rim: <91-10-27>

{Eo1} **pikl**/i** *a
{Da1} prikle *a
{De1} pikieren *a
{De2} verstopfen *a
{En1} prick out ∞ to *a
{En2} line out ∞ to *a
{Fr1} repiquer *a
{Sv1} skola *a
{Sv2} prickla *a
Planti junan planton ĵus produktitan. *a

Fon: *a HortKult144.

9 1 / p b - 2 4 3

Rim: pb: PIV havas "pikl/oj" (iu spicaĵo). <91-11-06>

{Eo1} **fotr**/i** [1] *tr* *a
{De1}
{En1}
{Fr1}

Koiti, parolante pri masklo (vulgaraĉe): *la hundo ~as la hundinon*. *a

Fon: *a AntPt;

9 1 / p b - 2 5 2

Rim: <91-11-10>

{Eo1} **kviz**/o** *a*b*c*ĉ*d*f
{De1} Quiz *n* *a*ĉ*d
{De2} Frage–und–Antwort–Spiel *n* *ĉ
{En1} quiz *b
{N11} quiz *c

Demando–ludo, precipe en radio aŭ televido, je kiu la ludantoj konkuras respondi al demandoj dum antaŭe fiksita tempo–daŭro. *e →~**estro** (91/pb–257)

Fon: *a KR; *b WE; *c Middel; *ĉ OK–ED; *d WG; *e pb; *f NePIV.

9 1 / p b - 2 5 6

Rim: <91-11-13>

{Eo1} **konferenc/a**
telefon/ad/o *a
{De1} Konferenzschaltung *a
{En1} conference call *b

Samtempa telefona konekto inter tri aŭ pli da personoj, kiuj povas troviĝi en diversaj lokoj, sed per la telefono kvazaŭ "konferencas". *a

Fon: *a pb; *b Webs;

9 1 / p b - 2 5 9

Rim: <91-11-13>

{Eo1} **frankliniz**/i** *a
{De1} elektrisieren *a
{De2} franklinisieren *a
{De3} mit statischer Elektrizität behandeln *a

Kuraciste apliki kurenton de alta tensio k malgranda intenso (uzante statikan elektron). → galvanizi, darsonvalizi, faradizi *a

Fon: *a STT;

9 1 / p b – 2 6 1

Rim: <91–11–16>

- {Eo1} **menist**/o** *a EVIT *f
{Eo2} **menonit**/o** *c*ĉ*d
{De1} Mennonit *m* *b*c
{De2} Taufgesinnter *m* *b
{En1} Mennonite *e

Ano de religia komunumo, iniciita de Menno Simons (1496–1561) en la 16–a jc. La ~oj kontraŭas la bapton de infanoj, ŝtatan devigon pri aferoj de kredo, milit–servon, ĵuron k divorcon. Persekutitaj kaj de la katolikaj kaj de la protestantaj landestroj ili fuĝis precipe al okcidenta Prusujo k Nederlando. De post 1683 multaj elmigris al norda Ameriko, kie hodiaŭ la plej multaj ~oj vivas. *f laŭ *b
Fon: *a MON91/11,p25; *b dtv–lex; *c BT; *ĉ EPol; *d NePIV; *e Webs; *f pb.

9 1 / p b – 2 6 6

Rim: pb: La formo {Eo1}, uzita en MON, ŝajnas al mi EVIT. Kial ne uzi {Eo2}, enkondukita jam antaŭ 30 jaroj en <BT> k konforma al la Angla k Germana formoj? <91–12–15>

- {Eo1} **mocarel**/o** *a
{De1} Mozzarella *f* *c
{En1} mozzarella *b
{It1} mozzarella *f* *ĉ

Mola, blanka, Itala fromaĝo kun milda gusto, uzata precipe en kuirado. *c laŭ *b

Fon: *a MON91/11,p25; *b
Webs; *c pb; *ĉ bern[pb];

9 1 / p b – 2 6 7

Rim: <92–04–15>

- {Eo1} **karaoak**/o** *a
{De1} Karaoke *n* *a
{En1} karaoke *a

Kantado de ne–profesiuloj laŭ la melodioj de populara elektronika muziko, provantaj imiti la voĉojn, gestojn movojn ktp. de famaj "pop"–kantistoj, ofte en la kadro de konkurso: *Satelita televid–programo invitas al pertelefona ~o–konkurso*. *a

Fon: *a pb

9 1 / p b – 2 7 1

Rim: <91–12–22>

- {Eo1} **akv/o–sor/ad/o** *a
{Eo2} **akv/o–glit/ad/o** *c
{Eo3} **akv/o–plane/o** *ĉ
EVIT *c
{De1} Wasserglätte *f* *b*ĉ
{De2} Aquaplaning *n* *b*ĉ
{En1} aquaplaning
{N11} aquaplaning *a

Glitado de aŭto-pneŭoj
sur malseka leno je alta rapido.
*c laŭ *b
Fon: *a Middel; *b Wah; *c pb;
*ĉ OK-DE

9 1 / p b – 2 7 2

Rim: pb: Laŭ PIV {Eo3} estas
"Surfacaĵo mergita subakve sub
la kareno de aviadila korpo aŭ
flosilo, por faciligi la ekflugon
per provizo de levforto", do
objekto, aĵo dum la nocio tie ĉi
celas proceson, adon. Pro tio
{Eo3} laŭ mi estas EVIT. «91–
12–22»

Esperanta indekso

91/pb–272 akv/o–glit/ad/o
91/pb–272 akv/o–plane/o
EVIT
91/pb–272 akv/o–sor/ad/o
91/pb–059 antaŭlern/ej/o
91/pb–026 blu_kask/ul/oj
91/pb–136 bor–platform/o
∞ mar/a
91/pb–177 ĉaled**/o
91/pb–177 ĉalet/o
91/pb–099 ĉikan**/o
91/pb–218 desodorant**/o
91/pb–049 desperad**/o
91/pb–156 driv*/o ∞
kontinent/a
91/pb–028 efik/o ∞
oranĝeri/a
91/pb–028 efik/o ∞ vitr/o–
dom/a

91/pb–059 et/ul–lern/ej/o
91/pb–032 Fanakal**/o
91/pb–028 forc/ej–efik/o
91/pb–135 form/o ∞
mikro'ond/a
91/pb–252 fotr**/i [1] tr
91/pb–261 frankliniz**/i
91/pb–130 front–rad/a
transmisi/o
91/pb–145 frost/o–
sek/ig/ad/o
91/pb–126 grand/a krak/o
teori/o de la
91/pb–053 halm**/o
91/pb–225 helic–tranĉ/il/o
91/pb–059 infan–gard/ej/o
91/pb–059 infan–ĝarden/o
91/pb–059 infan–vart/ej/o
91/pb–003 Jun/aj Turk/oj
91/pb–271 karaok**/o
91/pb–054 kartun**/o
91/pb–113 KFK
91/pb–059 kindergarten**/o
91/pb–113 klor/o–fluor–
karbon/at/o
91/pb–225 klup**/o
91/pb–259 konferenc/a
telefon/ad/o
91/pb–156 kontinent/a
driv*/o
91/pb–126 krak/o ∞ teori/o
de la grand/a
91/pb–256 kviz**/o x*f
91/pb–161 Laŭrazi**/o
91/pb–059 lern–lud/ej/o
91/pb–118 mar–ŝaŭm/o
91/pb–136 mar/a bor–
platform/o

91/pb-266 menist**/o
 EVIT
 91/pb-266 menonit**/o
 91/pb-118 merŝaŭm**/o
 91/pb-135 mikro'ond/a forn/o
 91/pb-267 mocarel**/o
 91/pb-232 ne'decid/it/a
 91/pb-073 nektaren**/o
 91/pb-073 nektarin/o
 91/pb-028 oranĝeri/a efik/o
 91/pb-107 orbit/o ∞ ter-
 sen'mov/a
 91/pb-107 orbit/o ∞ ter-
 sinkron/a
 91/pb-112 ozon/a tavolo
 91/pb-243 pikl**/i
 91/pb-162 pinjat**/o
 91/pb-232 remi**/a
 91/pb-232 remis**/a
 91/pb-218 sen'odor/ig/il/o
 91/pb-125 spion/a satelit/o
 91/pb-089 ŝtaŭt**/o
 91/pb-035 ŝvahil**/a
 91/pb-035 svahil*/a
 91/pb-035 svahil/o *ĝ EVIT
 91/pb-034 tangram**-/o
 91/pb-112 tavolo/o ∞ ozon/a
 91/pb-259 telefon/ad/o ∞
 konferenc/a
 91/pb-126 teori/o ∞ univers-
 eksplod/a
 91/pb-126 teori/o de la
 grand/a krak/o
 91/pb-107 ter-sen'mov/a
 orbit/o
 91/pb-107 ter-sinkron/a
 orbit/o
 91/pb-130 transmisi/o ∞
 front-rad/a

91/pb-003 Turk/oj ∞ Jun/aj
 91/pb-126 univers-eksplod/a
 teori/o
 91/pb-028 varm_dom-efik/o
 91/pb-059 vart/ej/o
 91/pb-028 vitr/o-dom/a efik/o

Deutscher Index

91/pb-272 Aquaplaning *n*
 91/pb-177 Berghütte *f*
 91/pb-026 Blauhelme *m, pl*
 91/pb-136 Bohrinself
 91/pb-054 Cartoon *m*
 91/pb-177 Chalet *n*
 91/pb-218 Deodorant *n*
 91/pb-049 Desperado *m*
 91/pb-261 elektrisieren
 91/pb-113 FCKW
 91/pb-113 Fluorchlor-
 Kohlenwasserstoff
m
 91/pb-256 Frage-und-
 Antwort-Spiel *n*
 91/pb-261 franklinisieren
 91/pb-145 Gefriertrocknen *n*

...ktp., simile por la aliaj lingvoj.

Senŝanĝa represo de la eldono
 08.1993 en 08.2006
 © ĉe Bernhard Pabst, Berlin
 bernhard.pabst[bei]gmx.de
 (anŝtataŭ [bei] skribu @)